

ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri kvarmonata agado, de 2023-07-15 ĝis 2023-11-15.

Ŝlosilpunktoj: resumoj de la 56-a ILEI-kongreso; novaĵoj pri la kongreso-2024; ILEI-forumoj kaj kunvenoj de la nove fondita retgrupo pri lerneja agado; plua renovigo de la retejo; novaĵoj pri la Komitato kaj Estraro; evoluo de la ekzistantaj kaj novaj projektoj; trejnseminario en Madagaskaro; proponoj de ILEI por la Internacia Tago de la Esperanta-Libro; iniciatoj por la celebrado de la 75-jariĝo de ILEI, inkluzive de eldonaj agadoj kaj Premio La Torre; vasta kunlaboro kun enmovadaj kaj ekstermovadaj institucioj.

Eventoj

UK 2023

ILEI havis budon en la Movada Foiro, prizorgatan de Alessandra Madella kaj Luigia Oberrauch, kiuj ankaŭ gvidis unu-horan prezentadon de ILEI dum la kongreso. Kiel viceprezidanto de la Ligo, Alessandra ĉeeste salutis nome de ILEI dum la solena inaŭguro. Kiel kutime, brile organizis la “Tagon de Lernado” Marija Belošević kun interesaj kaj altnivelaj kontribuoj de niaj membroj.

Kongreso 2023

La plej ĉefa kaj grandioza evento de ILEI dum tri pasintaj monatoj estis, sendube, la 56-a kongreso de ILEI, kiu okazis la 5-12-an de aŭgusto en Linjano Orsabra (itale: Lignano Sabbiadoro, norda Italio) kune kun la 79-a IJK, ambaŭ sub alta protektado de la Itala Ministro pri Instruado, oficialaj regionaj kaj lokaj instancoj, kun la temo “Instrui Esperanton en lernejoj”. Danke al la hibrida formato (fizika kaj virtuala) multaj programeroj estis registritaj kaj spektablas interalie ĉe la jutuba kanalo “Esperanto + Edukado ILEI”: <https://www.youtube.com/c/EsperantoEdukadoILEI/videos>

Inter la plej gravaj ĝiaj rezultoj:

- estis organizita la trejnseminario “Interkultura kompetento” enkadre de la projekto Erasmus KA2, zorge de Radojica Petrovic kaj Laura Brazzabeni. Ĝi daŭris kvar tagojn, partoprenis preskaŭ 40 personoj el 23 landoj. Fine la plej diligentaj partoprenintoj ricevis belajn atestilojn;
- okazis ILEI-Simpozio, zorge de Fernando Pita, kun la temo “Instrui – ne nur Esperanton! – ekster lernejaj medioj”;
- estis organizita la 102-a AMO-seminario kun la temo “Interkulturo en lernejoj”;
- okazis Komitatkunsido, unue post 3-jara paŭzo de fizikaj Komitatkunsidoj, sed ĝi estis partoprenebla ankaŭ rete por neĉeestantoj, kie oni decidis: aprobi la Estraran

jarraporton; akcepti novan ILEI-sekcion en Ganao; krome, estis prezentita nova, diligente preparita kaj kontrolita statistiko de la membraro de ILEI;

- ILEI okazigis kunvenojn kun TEJO, inkluzive pri daŭra kunlaboro;
- okazis multaj utilaj renkontiĝoj, konatiĝoj, interŝanĝoj de spertoj por plua evoluo de ILEI.
- Inter la signifoplenaj programeroj estis tagoj de Virina Agado, zorge de A. Madella, kaj la prezentado de videoj, kiel la 7-a parto de la Homa Ĉeno kaj la debuto de la filmo SGRAFITOJ de Ma-Ga-Filmoj. Krome estis filmita la 8-a parto de la Homa Ĉeno;
- Ekskursanoj iris al Venecio, Triesto, Udine kaj San Vito al Tagliamento, kie troviĝis la historia Esperanto-eldonejo Paolet kaj la urbestro akceptis la kongresanojn.
- Krome, en la jutuba kanalo de ILEI post la kongreso ne nur multe kreskis la nombro de vidoj (ĝis 701 vidoj en unu tago), sed ni estis atingantaj ankaŭ novajn grupojn: specife homojn inter 35-44 kaj 45-55 jaraĝoj. 65% de niaj spektantoj aĝas pli ol 65 jaroj, sed evidentiĝis juniĝo (kvankam iom pli ol TEJO-aĝa) de la spektantoj de la kanalo kiel konsekvenco de la kongreso. Ankaŭ dum UK kaj ILEI-kongreso estis disdonitaj revuoj de ILEI, portitaj al Italio danke al niaj samideanoj.

ILEI-Kongreso 2024

Estas deciditaj la loko kaj datoj de la kongreso: ĝi okazos en Brazilo en la turisma urbo Masejo (Maceió) de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2024. Jam estas formita LKK, prezidata de Aristophio de Andrade, estas pretaj la logotipo (verko de Aristophio), la kontrakto kaj la aliĝilo, kiu aperos en la novembro numero de IPR. Kongresa temo estas “Esperanto por justa edukado” dum la temo de la Simpozio, pri kiu zorgos Fernando Pita, estas “Lingvoj de instruado kaj justa edukado”.

ILEI-forumoj

La rolo de ILEI-forumoj estis prenita dum tiu ĉi tempo per la nove lanĉitaj forumoj por instruistoj “Lerneja Esperanto-agado”, laŭ ideo de Didier Janot. Jam okazis 3 retaj kunvenoj kaj unu hibrida. En ili partoprenis instruistoj el Francio, Serbio, Hispanio, Italio, Slovenio, Kroatio, Indonezio, Rumanio kaj aliaj landoj.

Plurlingvigo de la retejo de ILEI

La retejo de ILEI estas nun seslingva. Alessandra Madella gvidis la kreadon de bazaj enkondukaj tekstoj pri la agado kaj projektoj de ILEI en la ses oficialaj lingvoj de UNESKO kaj Unuiĝintaj Nacioj: la angla, ĉina, franca, araba, hispana kaj rusa. Zorgis pri la surretigo Cristina Bollini kaj pri la tradukoj Maximiliano Garcia, Wei Nigna, Maruf Sultan, Lin Lisa, Didier Janot, la estraranoj Fernando Pita kaj Elena Nadikova kaj multe da aliaj amikoj kaj membroj, inkluzive de la grava aldono de Emmanuelle Richard. La laboro estis farita por

akompani la agadon de niaj invititaj reprezentantoj dum la granda evento de UNESKO en Parizo en Novembro 2023, sed la enhavo estis elektita pro sia daŭripovo kaj novaj projektoj povas aldoniĝi por montri la vigecon de nia Ligo. Ĉar la lingvaj paĝoj rekte alireblas el la facile memorebla ĉefpaĝo www.ilei.info, ni alvokas al niaj membroj, por ke ili diskonigu kiel eble plej multe ilian ekziston dum siaj agadoj kaj en siaj retaj komunikiloj.

La Komitato

Krom la Komitatkunsido dum la Kongreso de Linjano, la 2023.09.22 okazis reta kunsido de la Komitato de ILEI de la 14:00 ĝis la 16:00 UTC, per Zoom, dediĉita speciale pri la financa parto. Dum la Komitatkunsido: estis aprobita la nova financa kontrolisto de ILEI, S-ro Simon Smits; estis aprobitaj la Raportoj de la Kontrola Komisiono por 2022; la Financa Raporto 2022; la Buĝeto 2023 kaj Buĝet-propono por 2024. Estis aprobita la stariĝo de la novaj afrikaj sekcioj de Benino, Kenjo kaj Madagaskaro. Granda diskutado temis pri la financa situacio de la revuo *Juna Amiko*.

La Estraro

La Estraro komencis plani la festajn eventojn/projektojn por celebri la 75-jariĝon de ILEI en 2024 kaj alvokas ĉiujn samideanojn aliĝi al tio!

Nia kasisto Karine Arakeljan kapablis solvi la situacion kun la banko-konto de ILEI en Nederlando, kiu nun ŝajnas esti en ordo.

Sekcioj

Kiel dirite, dum la lastaj Komitatkunsidoj la Komitato aprobis kvar novajn ILEI-sekciojn: Benino, Ghanao, Kenjo, Madagaskaro. Gratulojn al niaj afrikaj samideanoj! Ankaŭ la hispana sekcio estas promesplene reorganizanta sin mem.

Senegalo daŭrigas la tradicion de ILEI raportoj ĉiujn tri monatojn: jam venis la tria tia raporto. Marija Jerković, kunlabore kun Renato Corsetti, sukcesis kolekti la jarraportojn de pluraj sekcioj kaj estas verkanta resumon de ili por la retejo de ILEI.

La 29.09-02.10.2023 okazis TORPEDO – la Tradicia Oktobra Renkontiĝo Pedagogia, kiu estas evento por interesiĝantoj pri instruado de Esperanto. Ĝi ofertas fakprelegojn, forumon, spertinterŝanĝon, diskutadon. La kelktagan eventon organizis Esperanto-Centro Herzberg/Klerigejo de GEA kaj AGEI, germana landa sekcio de ILEI. La kunveno okazis en hibrida formato.

Projektoj

“Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lerneano en la tuta mondo”

Kadre de tiu iniciato disvolviĝas prezentado de Esperanto tra la mondo. Novaĵoj venas de Japanio, Francio, Svislando, Ĉinio, Hispanio, Irano. *Gratulojn kaj dankojn al niaj samideanoj!*

Nova video-kurso

ILEI donas moralan subtenon al la didaktika videoprojekto de Maximiliano Garcia kaj Wei Ningna "Lernu pri la Tea Mondo pere de Esperanto". Temas pri 10 lecionoj, produktotaj de MA-GA FILMOJ (kiu jam bonnivele produktis LA SILKA VOJO kaj SGRAFITOJ). Ĝi iel inspiriĝas de la ideo de Dennis Keefe, ke devus ekzisti bone faritaj kursoj en Esperanto pri ĉiuj kampoj de la homa scio kaj praktika agado. Kaj ĝi celas publikon de junuloj.

Universitata agado

En la 2-a de oktobro rete okazis la 43-a sesio de la Kunpens(ig)ado pri Esperanto en Universitatoj, kie diskutis dek partoprenantoj de landoj: Barato, Brazilo, Britio, Ĉinio, Germanio, Hungario, Hispanio, Irano kaj Italio/Britio. Renato Corsetti, kiel ĉiam, prezidis la sesion; jen lia raporto pri ĝi:

“Michele Gazzola prezentis la revuon *Language Problems and Language Planning*, <https://benjamins.com/catalog/lplp>. La ĉefa mesaĝo: sendu altkvalitajn artikolojn pri politikaj kaj socilingvistikaj problemoj de kiu ajn lingvo en la mondo. la artikoloj aperas en naciaj lingvoj kun resumoj en Esperanto kaj en aliaj du lingvoj. Poste oni parolis pri la studenta klubo en la universitato de Giridhar Rao, pri la provoj informi pri Esperanto la studentojn de la universitato de Valencia. Poste Arko parolis pri la peto de Esperanto-kursoj fare de ĉinaj universitatoj kaj fine estis raportetoj pri sukcesaj varb-agadoj en germanaj kaj iranaj universitatoj.”

La registraĵojn de la antaŭaj sesioj vi povas spekti en la jutuba kanalo de UEA: <https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CMqTrpXMay2YVfrhDYT-Vm5>

Ili estas spekteblaj (kaj elŝuteblaj) ankaŭ en la retejo de la Irana Esperanto-Asocio, IrEA, prizorgata de Hamzeh Shafiee: <https://www.espero.ir/eo/category/kunpensigado/>

La sekva Kunpens(ig)ado, la 44-a, okazis la 6-an de novembro.

Korespondado inter universitataj studentoj

La studentoj de la Esperanto-fako de Zaozhuang korespondas kun universitataj studentoj kaj aliaj junaj esperantistoj el Italio, Japanio, Koreio kaj Rusio.

Interŝanĝoj de lernejoj

Plu evoluas la projekto pri interŝanĝo de lernejoj, komencita pasintjare de la franca instruisto Emmanuel Desbrieres. Enkadre de ĝi Emmanuel estas nun organizanta serion de retkunvenoj inter gejunuloj, inkluzive TEJO-anojn, tra la mondo. La ĉefa celo estas, krom praktiko de la internacia lingvo, pace kunigi junulojn de la tuta mondo. *Gratulojn kaj sukcesojn al nia kolego el Francio!*

Kapabligo

Trejnseminario en Madagaskaro

La estraro decidis subteni tri-tagan trejnseminarion por novaj Esperanto-instruistoj en Madagaskaro, kunlabore kun UEA. La agado okazos en decembro 2023.

Eldonado

Viglas la eldonaj projektoj de ILEI, ankaŭ kiel parto de la celebrado de la 75-jariĝo de la Ligo en 2024.

Daŭras esplorado ene de la Estraro pri la traduko de la libro de Alessandra Madella "Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la lernado de aliaj lingvoj", kiu en 2023 jam aperis en Esperanto kaj en la Itala, iĝante unu el la plej venditaj libroj dum la UK de Torino. Ĝis nun sin anoncis planintaj tradukojn al la bulgara fare de Mariana Evlogieva kaj al la kroata fare de Marija Jercović. Zorgos pri la tradukado por la korea eldono Sumi Chan, kun la kunlaboro de Korea Esperanto-Asocio, dum Alessandra mem tradukos la libron al la angla, kun la kontrolado de ties denaskuloj.

Alessandra ankaŭ zorgos pri la redaktado de la *Aktoj de la Simpozioj* de ILEI 2022-3, kiuj aperos bite kaj papere fare de Edistudio.

Pri la verkaro de Antonietta Bernardoni, organiziĝis traduko al la ĉina. Komitatano Ermanno Tarracchini kaj la aliaj membroj de la Kolektivo Bernardoni interkonsentis kun S-ro Semio de Zaozhuang-Universitato, por ke li organizu la tradukon fare de la studentoj de la Esperanto-fako. La pago por la laboro jam estis farita pere de la Shandong-a Esperanto-Grupo. La bita versio estos publikigita en nia retejo kun la ISBN-kodoj de ILEI, sed oni povos eble konsideri ankaŭ paperan eldonon.

Pliaj eldonaj projektoj nun pristudataj de la estraro inkluzivas eblan serion de la plej bonaj artikoloj de IPR kaj broŝuron de la eseoj premiitaj en la Premio La Torre.

Krome, la Ligo intencas lanĉi konkurson por la verkado de lernolibroj por afrikanoj, kies enhavoj estu laŭ la afrikaj medio kaj kulturo.

Premio La Torre

Ankaŭ en 2023-4 familio La Torre pretas subteni novan eldonon de la Premio, dediĉita al la karmemora prezidanto de ILEI, Maŭro La Torre (1946-2010). La estraro de ILEI decidis montri sian dankon helpante altigi la monan sumon por la gajninto, kiu estos 700 eŭrojn en 2024. La anonco pri kiel partopreni en la eldono 2023-4 aperos en IPR, krom en la retejo de ILEI kaj per niaj komunikiloj.

Tago de la Esperanta Libro

Por la komuna legado dum la Internacia Tago de la Esperanta Libro/ Zamenhofa Tago, t.e. la 15-a de decembro 2023, la Estraro de ILEI proponas du verkojn. Por progresintoj temas pri la eseo *La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo* (1937) de Julius Glück, tre aktiva

propagandisto kaj instruisto de Esperanto, murdita en Auschwitz. Por komencantoj temas pri la unuaj du ĉapitroj de *La Teorio Nakamura* de Anna Löwenstein, bazo de la fama Esperanto-kurso en Lernu.net. En ambaŭ kazoj la materialoj libere elŝuteblas el la retejo de ILEI baldaŭ. Intervjuo kun Anna pri la libro aperos en Ĉina Komunikila Grupo.

IPR kaj JA

La kasisto Karine Arakeljan preparis apartan bilancon pri abono de JA. La diskuto pri sorto de tiu revuo daŭras kaj la Estraro klopodas trovi solvon por daŭripovigo de la fama periodaĵo. *La Estraro alvokas ĉiujn neindiferentajn samideanojn helpi por konservi nian “juvelon”!*

Varban tekston pri JA pretigis kaj aperigis en EKO 59 S. MacGill kaj daŭrigos tiun iniciaton. *Dankon al Stefan!*

ILEI en la Reto

La jutuba kanalo de ILEI, t.e. “Esperanto + Edukado ILEI” (<https://www.youtube.com/@EsperantoEdukadoILEI>) estas daŭre pli riĉiĝanta pere de la projektoj kaj aliaj agadoj de la Ligo kaj ĝia membraro.

Priskribo de la projekto “30 oraj horoj”, iom mallongigita, aperis ĉe uea.facila (<https://uea.facila.org/artikoloj/libroservo/tridek-oraj-horoj-r383/>).

Kunlaboro kun enmovadaj institucioj

ILEI partoprenos en la Eŭropa Kongreso de Esperanto, kiu okazos post kelkjara paŭzo en Strasburgo, Francio, 2024.05.08-12. Estos interkonsentitaj du programeroj: prelegoj pri la 30 Oraj Horoj (proponita de Laura Brazzabeni) kaj pri la trejnado de volontulaj instruistoj (proponita de Radojica Petrović).

Kun UEA

Kiel ĉiam, granda estas la kunlaboro kun UEA. Ĉi-rilate menciindas, ke la 11-an de novembro François Lo Jacomo citis la «studojn de ILEI pri lingvofaciliga Esperanto» je la fino de sia brila alparolo al la publiko de UNESKO (<https://www.youtube.com/watch?v=7Xm3OicK7C0&t=5287s>).

Kun Esperanto-USA

Esperanto-USA ĵus publikigis 50 filmetojn en Esperanto por la Bona Filmfestivalo. Partoprenis ankaŭ la filmeto LA LUMO DE LA ESTONTO farita de Alessandra Madella kun samideanoj de la Parma Grupo kaj junuloj el Afriko. Vi povas spekti ĉiujn 50 (pli ol 2 horoj entute!) en la jutuba kanalo “EsperantoUSA” (<https://www.youtube.com/@EsperantoUSA>).

Kun Ĉina Komunikila Grupo

Viglaĵaj videoj pri la UK de Torino kaj la kunkongreso de Linjano (ILEI/TEJO) aperis en la retejo de la Ĉina Komunikila Grupo, kies parto la Esperanta redakcio de Ĉina Radio Internacia nun estas. Ili estis filmitaj de A. Madella kaj muntitaj de Mirinda.

La 29-a de Julio Ĉina Komunikila Grupo okazigis forumon kun la temo ‘Kulturaj Interŝanĝoj kaj Esp-disvastigo en la Nova Epoko’. Niaj prezidanto kaj vicprezidanto Ahmad kaj Alessandra estis invitatitaj paroli nome de ILEI, kiu aperis kiel kunorganizanto de la evento, kiu estas spektebla i.a. en <https://www.facebook.com/criesperanto/videos/816546079676408>. Kvankam ili parolis mallonge, estis bona ŝanco de granda videbleco. Ahmad parolis pri justa edukado, kies premiso ja estas justa monda lingvo-ordo, kiun garantias universala utiligado de Esperanto. Alessandra informis pri la projekto “La 30 Oraj Horoj”, la prestiĝa premio pri kvalito de instruado, kiun ŝi ricevis de Erasmus kaj INDIRE, kaj pri ŝia libro pri lernofaciligata Esperanto, menciante precipe la eksperimenton de Jennifer kaj Alan Bishop kaj tiun de Wei Yubin (Jado), same kiel la korespondadon inter ĉinaj studentoj kaj italaj kaj francaj lernantoj.

La 12-an de oktobro A. Madella estis invitata ĉeesti la 11-an Tutmondan Video-Mediatan Forumon, kiu estis organizata en Pekino de Ĉina Komunikila Grupo. Ŝi ĉeestis kiel "Esperanto ILEI". Alparolis la publikon du ĉinaj vic-ministroj kaj pluraj estroj de komunikilaj organizoj, precipe el Afriko, Arabaj landoj kaj Azi-Pacifikaj landoj, sen forgesi Eŭropon. Estis tre interesa renkontiĝo, precipe en la parto pri la edukado de ĵurnalisto kaj pri la interŝanĝo de komunikilaj enhavoj por atingi novajn publikojn, larĝigi la merkaton kaj pliigi la reprezentadon de diversaj kulturoj/malplimulto.

Aperis nova artikolo de nia vicprezidanto Alessandra Madella ĉe ĈRI pri la Esperanto-arbaro en Zaozhuang, Shandong, Ĉinio:

<https://esperanto.cri.cn/2023/10/05/ARTIV7vgeUKRCjxXVstwfcbd231005.shtml>

Alia artikolo ŝia legebla en la sama rubriko temas pri la dekjariĝo de la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-Universitato kaj ties celebrado.

Kun EsperRadio

Ankaŭ tiu itala radio (<https://www.youtube.com/@EsperRadio>) vigle kovris la internaciajn kongresojn en Italio en somero 2023, kun videoj kaj en la itala kaj en Esperanto zorgite de Laura Brazzabeni.

Kunlaboro kun ekstermovadaj institucioj

Kun UNESKO

En novembro 2023 ekis la granda evento de UNESKO en Parizo, kiu okazas ĉiujn du jarojn, kun reprezentantoj de ŝtatoj kaj NRO-oj. ILEI estis inter la naŭ NRO-oj ne en konsultaj rilatoj kun UNESKO, kiuj estis tamen invitatitaj partopreni. Niaj reprezentantoj ĉi jaron estas Didier Janot, Emmanuel Desbrières kaj Gilles Tabard. Kiel ni skribis, por tiu evento estas pretigita la

ses-lingvaj paĝoj en la retejo de ILEI. Krome, niaj reprezentantoj sukcesis havi budon por disdoni inform-foliojn kaj materialojn.

Kun Zaozhuang-Universitato

Kadre de la celebradoj por la dekjariĝo de la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-Universitato, en oktobro 2023 Alessandra Madella prezentis al 150 gestudentoj de la Fremdlingva Departamento siajn mallongajn filmojn en Esperanto (LA LUMO DE LA ESTONTO, LA AVENTUROJ DE SAĜA STELETO KAJ DE LA MIRINDA TEAMO kaj la 8-an parton de la HOMA ĈENO, muntita de M. Garcia). Komence de novembro 2023, ŝi rete prelegis al interesataj ĉinaj kaj koreaj samideanoj pri sia libro “Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj”.

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu niajn elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Ahmad Reza Mamduhi

2023-11-15